# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO
P.K. 39004, TEL AVIVO
N-ro 66 - NOVEMBRO 1978

האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל
ת.ד. 39004, תל-אביב
העורך: אלכסנדר מנור
חוברת 66-נובמבר 1978

ENHAVO


| | | |
|---|---|---|
| El la historio de nia Movado | A. Manor | 1. |
| Nia vojo al la fina venko | H. Maŝler | 4. |
| Impresoj de la kongresano en Varno | J. Giladi | 6. |
| 55 jaroj kun Esperanto | I. Dektor-Ginsburg | 8. |
| Niaj universalaj kongresoj | J. Giladi | 9. |
| Alvoko | | 10. |
| La sugestinto (trad. J. Kohen-Cedek) | Z. Ĵabotinski | 11. |
| Mikspoto da impresoj pri vojaĝo | R. Alberg | 12. |
| Kalkulmetodo de la tago | I. Levin | 14. |
| Israelaj atingaĵoj | H. M. | 16. |
| Kredu aŭ ne | J. Ŝemer | 17. |
| Poŝtmarkoj pri E-o premiitaj | N. Heler | 18. |
| JELI - angulo | | |
| Limerikoj | D. Mager, J.Ŝ. | 19. |
| El nia Movado kaj agado | | 19. |


ESPERANTO אספרנטו
השכבה הבינלאומית

# ISRAELA ESPERANTISTO


ORGANO de ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

P.K. 39004, Tel Avivo

N-ro 66 - NOVEMBRO 1978

Ĉefredaktoro: Aleksander Manor

Redaktoro: Josef Ŝemer

Ornamis: Irit Klajner



## EL LA HISTORIO DE NIA ESPERANTO-MOVADO - A. Manor

La unuaj grajnoj de la E-o - Movado en Israellando estis semitaj en Jerusalemo dum la turka regado, antaŭ la unua mondmilito (vidu I.E., N-ro 64). Post la milito, dum la tempo de mandato kaj angla regado, komenciĝis la evoluo de la e-ista movado en Israellando kvazaŭ samtempe en Jerusalemo kaj en Tel-Avivo. La plej elstara aktivulo kaj renoviganto de la movado en Jerusalemo estis N.B. Ĥavkin kaj en Tel-Avivo - la advokato Mark Gorodiski. Sed ni devas substreki, ke Tel-Avivo antaŭiĝis Jerusalemon je unu jaro. La unua E-o -Societo en Tel-Avivo fondiĝis en la jaro 1923 (en Jerusalemo-1924) kaj prezidis ĝin Mark Gorodiski. Tio signifas, ke la unua E-o - Societo en Israellando post la unua mondmilito fondiĝis en Tel-Avivo. La nomo de tiu ĉi societo estis "Paca Stelo" kaj en ĝi partoprenis kune Judoj kaj Araboj. Tio hodiaŭ sonas kvazaŭ kiel fabelo, ke la araba aktivulo, kiu propagandis la Internacian Lingvon inter la Araboj en Jafo estis Arafat, la onklo de Jaser Arafat, la hodiaŭa ĉefo de P.L.O., araba terorista organizo, kies celo estas detrui Israelon.

La plej agemaj e-istoj en la T-A-a societo estis, krom la advokato M. Gorodiski (prezidanto), Josef Ravikov - sekretario kaj Mordeĥaj Ĥejruti (Velker), kiu laboris en la ofiĉejo de adv. Gorodiski kaj poste studadis kaj fariĝis mem advokato. Ĥejruti venis en 1920, kiel fervora e-isto de la pola urbo Sambor. En Tel-Avivo li gvidis kursojn kaj estis aktiva propagandisto. La rilatoj inter la membroj de la societo estis tre amikecaj. Gorodiski sukcesis krei afablan kaj familian etoson inter la societanoj, aranĝante renkontiĝojn ĉe si hejme.

La unua bildo (1924)

La supra vico: 1. Lurie, 2. Gen, 3. Arafat, 4. Arabo de Jafo, 5. J. Ravikov, sidas: 1. Gureviĉ, 2. Kino, 3. Gorodiski, 4. Kvitner, 5. Ĥejruti.



Ni afable dankas al Josef Ravikov, kiu donis al ni la komunan bildon de la societo "Paca Stelo". (Vidu la paĝon 3).

Staras en la supra vico, de dekstro al maldekstro:
1. Slucki, 2..., 3. Voloviĉ, 4. Mas, 5. Kaplan, 6. Denkner (frato de urbestro de Natanja- Oved Ben-Ami), 7. Pasmanik, 8...,
dua vico: 1...,2..., 3. Hofman, 4...,5..., 6. Sara Jonas, 7. Sara Kohen, 8. Ida Reĥter (la edzino de Hejruti), 9....
tria vico: 1. Arafat, 2. First, 3. J. Ravikov, 4. M. Gorodiski (Lia filo estas nun la jura konsilanto de la Tel-Aviva urbestraro), 5. M. Ĥejruti, 6. Gurviĉ, 7. Inĝ. Fajnŝtajn, 8. Gen.
La kvara vico (kuŝas sur la planko) 1..., 2. Lurie, 3. Lehavi, 4..., 5....



## NIA VOJO AL LA FINA VENKO

En la lasta tempo ni multe legis pri la grandega antaŭenpaŝo de la irana movado. Ĝi certe estas ĝojiga afero, sed mi ne certas, ĉu ĝi estas signo de alproksimiĝanta venko. En Israelo ni jam trapasis tiun periodon. Eble ni faris pli multe malgraŭ en pli longa tempo. La rezultoj tamen estas ne alproksimiĝo al la celo, sed kreado de interesa esp. parolanta rondo, kiu malgraŭ fortstreĉoj de la aktivuloj, malgraŭ senĉesaj kursoj por la komencantoj kaj por la progresantoj, malgraŭ oftaj intervjuoj en radio, televido kaj gazetaro, malgraŭ la helpo de urbestraro, ne montras eĉ malgrandan signon de la kreado de la multnombra landa movado. Pli malbone La rondoj, la kursoj estas nur en Tel-Avivo kaj ĉirkaŭaĵo kaj nenio ŝanĝiĝis en aliaj urboj.

Nia movado ricevis formon de la malgranda filio de la Internacia Movado, simila al rotario aŭ framasonoj. Tiuj movadoj havas avantaĝon kompare kun ni. Aniĝi tie povas ĉiu, kiu havas monon por la kotizo. Por esti esperantisto oni devas scii la lingvon, kiu malgraŭ la kompara facileco postulas minimume tri jarojn de uzado por atingi uzeblan nivelon. Eĉ Fakdelegito povas esti nur dujara spertulo. Estis ĉe ni multaj agemaj adeptoj, kiuj estis entuziasmigitaj en la komenco, sed ili estis forpuŝitaj dum la Estrarkunsidoj, ĉar ili ne komprenis sufiĉe la lingvon. Samtempe ni ne sukcesis krei sufiĉan nombron da instruistoj, ne havas bonajn lernolibrojn kaj vortarojn. Evidentiĝas, ke ne ĉiam bona esperantisto estas bona instruisto aŭ sperta aganto por nia movado.

Mi ne proponas forigi nian ĝisnunan agadon, kiu ankaŭ estas grava kaj interesa kaj donas al la parolantoj avantaĝojn, sed ĝi ne estas ĉio.

Kion ni bezonas?

Unue monon! Ni devas krei multnombran poresperantan organizon de ne-esperantistoj. Ĝi devas membrigi ĉiujn homojn, kiuj volas kaj povas helpi al ni per siaj politikaj influoj, per kapableco kolekti monon, per influo je ŝtataj instancoj, kiuj povas finance subteni la movadon, kiuj influos diversajn instituciojn, kiuj kutimas malavare doni la monon al la kulturaj institucioj. Tiu organizo devas esti en ĉiama kontakto kun UEA kaj kun la Landaj Asocioj.

Due: Per la akirita mono oni devas eldoni multajn lernolibrojn je ĉiuj niveloj de la aĝo kaj inteligenteco en multaj lingvoj. La lernolibroj devas esti malmultekostaj kaj subvenciitaj. Simile ni bezonas multajn vortarojn. Oni devas eldoni en naciaj lingvoj informilojn pri atingaĵoj de la Movado. Oni devas eluzi aŭdovidan sistemon por



la instruado, eldoni multajn gramofonajn diskojn kun lernolibroj, por ke malproksime vivantaj homoj povu lerni sole la lingvon. Grave estas instigi samideanojn kaj simpatiantojn testamenti la monon al la Movado.

3. Ĉiun jaron esplori publikan opinion de la socio pri la kono de la problemo de Esperanto. La esploro devas fariĝi land-kaj mondskale. La rezultoj de la esploro devas esti publicitaj en ĵurnaloj, radio kaj televido.

4. Krei grandan aron da instruistoj. Ĝi estos farebla se ni sukcesos krei kondiĉojn por ĝi. Ni devas zorgi, ke la kursoj, kiujn la instruistoj devus partopreni, estus egalvaloraj, kiel elekto de pedagogio, psikologio, matematiko k.t.p. Se estos profesioj, kiuj donas avantaĝojn al la homoj, kiuj konas la fremdajn lingvojn, oni devos tiujn avantaĝojn doni ankaŭ al la esperantistoj (Turistoficejoj, hotelistoj, policistoj). En la komenco la esperantaj organizaĵoj devos subvencii la aferon.

5. Zorgi en la ministerio de edukado, ke Esperanto povu esti elektita, kiel fremda lingvo por ekzamenoj, precipe por la maturekzameno. Ŝajnas, ke ne estos grandaj obstakloj por konvinki la lernantojn elekti Esperanton, se ĝi donus al ili samajn privilegiojn, kiel alia fremda lingvo. Ĝi povus ankaŭ doni al la instruistoj de Esperanto aldonan profiton per ĝia instruado. Esperanto devas fariĝi objekto por studado de la lingvistiko kaj aliaj fremdaj lingvoj. Tiuj problemoj ne povas esti solvitaj per malgrandaj landaj asocioj, sed nur per la amasa poresperanta movado.

6. Zorgi ke la lerneja televido enkonduku kursojn helpe de lertaj esperantistoj kun subteno mona de supre menciitaj fontoj. Ke ĝi donu informojn pri E. kaj d-ro L. Z.

Kion ni ne devas fari:

Ni ne devas postuli enkondukon de la deviga instruado en ĉiujn lernejojn de la lando, ĉar ni fiaskos ne havante ilojn por tiu solvo kaj tiu fiasko povas fariĝi malhelpo dum multaj jaroj.

La Estraro- kunsidoj estu gvidataj en la nacia lingvo, ĉar alie ni forpuŝas ĉiujn, kiuj volas nin helpi, sed ne konas sufiĉe bone la lingvon.

Ne malŝpari la monon por ekstereŭropaj landoj por krei rondon de Esperantistoj, sed koncentri ĉiujn fortojn por iu grava turista eŭropa lando (Nederlando, Svislando, Italio). Se iu de tiuj landoj venkos, la venko antaŭenmarŝos aŭtomate, ĉar ĉiu turisto, se li devos viziti iun de tiuj landoj, certe oferos kelkajn semajnojn de la lernado por esti komprenata dum sia ekskurso. Kontraŭe, se ni venkos en Israelo aŭ en Madagaskaro, ĝi ne influos aliajn landojn.

La proponitaj solvoj ne devas ĉesigi nian ĝisnunan agadon, ĉar precipe en la komenco ni devas esti fajrero kiu ekflamigos grandan fajron, kiu poste mem brulos.

Resumo:
La vojo al la fina venko venos per la forta por-esperanta movado de ne-esperantistoj, kiu eluzos sian forton por influi politike la ŝtatajn instituciojn zorgi pri Esperanto kaj trovos financajn rimedojn por subteni en la komenco la antaŭenmarŝon de nia Movado, alie ni restos tre interesa kaj amuziga ekskluziva klubo de esperante parolantaj idealistoj.

d-ro H. Maŝler




## IMPRESOJ DE KONGRESANO EN VARNO (Bulgario)


### 1. "Ora ŝlosilo"

La UK* ĉeestis8 s-anoj el nia lando. La nombro povus esti pli granda, se ne la malfacilaĵoj por akiri la bulgaran vizon. Jam en la komenco de la jaro ni atentigis UEA pri tiu problemo kaj petis peradon kaj alian helpon. Post interŝanĝo de kelkaj leteroj kaj telefon-interparolo kun Roterdamo venis certigo de s-ano Aleksiev, LKK**-estro en Bulgario, ke"ĉio estos en ordo" kaj ke la bulgara ambasado en Ateno estas informita kaj ĉiu kongresano, kiu havos oficialan invitilon de UEA ricevos la vizon. Evidentiĝis, ke la kongreso estas aparta afero kaj la politiko aparta. En la bulgara ambasadejo ne helpis la oficiala invitilo. Respondo estis: "Ni devas sendi telegramon al Sofio kaj atendi ĝis venos respondo". Feliĉe troviĝis alia eliro, kiel diras la proverbo: "Por la mono pastra preĝo, por la mono romp' de leĝo". En vojaĝoficejo, kiu havas komercajn rilatojn kun "Balkanturs", oni informis nin, ke ĉiu kiu pagas per dolaroj por la hotelo, ricevas enirpermeson al Bulgario sen oficiala vizo.


### 2. La kongresejo


La palaco de Sporto kaj Kulturo en Varna, konstruita ĉe la ĉefa ŝoseo, kiu gvidas al Druĵba, Zlatni, pjaseĉi kaj Balĉik; videbla de la granda publika ĝardeno; elstara pro ĝia arĥitekturo, ŝipstilaj konturoj; aspektas kiel giganta betona ŝipo. La ĉefa salono kun ĝiaj 5000 sidlokoj, la halo kaj multaj aliaj salonoj kaj ĉambroj en 3 etaĝoj, ĉiuj ekipitaj per komfortaj mebloj kaj instalaĵoj, tapiŝoj "de muro al muro", estas tre impresaj.





### 3. La devo kaj la plezuro





Granda diferenco estas inter la ordinara kongresano, kiu venas al la UK por renkonti geamikojn kaj akiri novajn, aŭskulti la salutvortojn de la diversaj eminentuloj, ĉeesti la teatran prezentadon, filmon, aliajn distrajn vesperojn, danci dum la balo, tosti ĉe la bankedo k.t.p.(per unu vorto: ĝui semajnon de internacia kaj samtempe familia kaj frata etoso) kaj LKK-anoj, Komitatanoj kaj Estraranoj, por kiuj ĝi estas semajno de streĉa laboro, ĉar neniam estas sufiĉe da tempo por manĝi trankvile, ripozi iomete post la manĝo. Ĉiam oni devas kuri de unu kunsido al la dua, bedaŭri ke oni ne povas ĉeesti samtempe alian programeron kaj havi senton ke oni multon perdas kaj mistrafas.

### 4. La Smoljana Postkongreso

Kiam mi rakontis al s-anino Josifa ke mi aliĝis la Smoljanan Postkongreson kaj ankoraŭ restis kelkaj liberaj lokoj kaj se ŝi volas ŝi povas ĝin aliĝi, ŝi unue hezitis, sed kiam ŝi ekscios, ke oni ankaŭ trapasos Veliko Tirnovon*** ŝi tuj decidis kaj aliĝis, ĉar ŝi diris: "Mi enamiĝis en tiu urbo kaj ĝojas, ke mi havos okazon ĝin revidi". Mi pensis, ke ŝi iomete troigas, sed kiam ni la sekvitan tagon alvenis tien, mi povis kompreni. Ĝi vere estas ĉarma kaj pitoreska urbo, situanta sur la montetoj kaj valoj kun akre ruĝaj tegmentoj inter multaj arboj, arbustoj, ĉiuj specoj da kreskaĵoj kaj floroj. La okulo vagas de unu flanko al la dua kaj ne laciĝas, nek enuiĝas rigardi kaj admiri dum horoj kaj horoj.

Denove mi havis okazon sperti la gastamon de la Bulgaroj. La gvidantoj de la ekskurso ne ŝparis la tempon kaj energion por plenumi ĉiujn kaprizojn, montri al ni ĉiujn vidindaĵojn, doni al ni pli ol ni mem deziris. Ni estis grupo de 30 e-istoj el 14 landoj kaj ni ekskursis ne nur al Smoljan, kie la bulgara ŝtato konstruas e-o seminariejon. Post klopodoj de la lokaj e-istoj la ŝtato subvenciis milionon da dolaroj por tiu celo.

Ni ekskursis tra tuta Bulgario, tagmanĝis en luksaj restoracioj, ĉiun tagon vidis alian urbon kaj vespere atingis luksan hotelon, tie vespermanĝis, tranoktis, matenmanĝis kaj ree prenis la valizojn al la aŭtobuso. Dum la semajno ni ĉiuj amikiĝis kaj fariĝis kiel unu familio. Estis ĝi neforgesebla semajno kaj la plej sukcesa Postkongreso, kiun mi spertis.

J. Giladi



* UK: Universala Kongreso
** LKK: Loka Kongresa Komitato
*** En Veliko Tirnovo okazis la Internacia Junulara Kongreso ĵus antaŭ la UK de Varno.

## 55 JAROJ KUN ESPERANTO

Fervora amiko de d-ro L.L. Zamenhof, d-ro Medem, ian printempan tagon 1923 venis en nian gimnazion kaj prelegis pri la Internacia Lingvo. Li parolis tiel konvinkeme kaj interese pri ĝia facileco kaj pri kontaktoj kun la vasta mondo, ke en Litovio tre rapide kreiĝis granda grupo, kiu ellernis E-on kaj jam en aŭgusto veturis Nurenbergon por partopreni kongreson. Inter ni estis ankaŭ d-ro Toker, tiam studento kaj mi, gimnazianino de la 7-a klaso.

Mi tre facile ellernis la lingvon sen ies helpo aŭ instruado kaj post unu ĝis du monatoj povis babili. La etoso en la postmilita Nurenbergo estis tre malfacila. La inflacio minacis tute detrui la ekonomian vivon. Por la salajro oni povis aĉeti tre malmulte sed eksterlandanoj kun fremda valuto estis kompare "tre riĉaj".

La UK faris grandiozan impreson. Partoprenis ĝin 5000 e-istoj el 44 landoj. Estis tre gaje ĉar inter ili estis multaj junaj homoj kaj la plezura parto estis tre vigla kaj bone organizita. Mem la ĉeestado en tiu antikva urbo bele situanta estis granda plezuro. Post la UK ni partoprenis diversajn ekskursojn en la Saksa Svisujo, Drezdeno kaj Elbo. Mi ĝis nun memorasla mirindan senton de la UK, la ĝojon interparoli kaj kompreni homojn sen tradukisto. Mi parolis kun Dravido de Hindujo, Grenlandano, Japano same kiel kun Poloj kaj hispana belulino en sia efekta nacia kostumo.

Dum la kongreso en Berno en 1939, kiam mi jam finis la filologian fakultaton, estis por mi interese konkludi de la ekparolo la naciecon de la parolanto. La diversa prononco kaj intonacio aldonis al mi ĉarmsenton malgraŭ iam estis por mi malfacile kompreni. Mi tiam tre bone sentis la gravecon de Internacia Lingvo. Dum tiu UK ni sentis alproksimiĝantan danĝeron por la homaro de la naziismo en la najbara lando.

Fakte la hitleristoj uzis E-on por kaŝi siajn barbarajn planojn, tamen por la kongresanoj la ideo de d-ro Z. pri forigo de baroj inter la nacioj ne ŝanĝiĝis. Ni bone komprenis la venontan danĝeron, kiam mi en Berlino vidis en ĝardenoj tabulojn- "por judoj kaj hundoj la eniro malpermesata." Inter aliaj mi konatiĝis kun d-ro I. Lapenna de Zagreb (poste prezidanto de UEA kaj profesoro). Li estis ne nur fidela al la ideoj de d-ro L.L.Z., sed ankaŭ estis je la flanko de niaj rajtoj.

En Svisio tiam regis ankaŭ malamo al faŝismo kaj volo batali kontraŭ penetrado de ĝiaj ideoj malsimile al manko de la rezisto de la flanko de Aŭstrio.

Bedaŭrinde ĉiuj bildoj de ambaŭ UK estis perditaj dum la milito, kiam la faŝistaj barbaroj okupis Litovion. Estis tiam murditaj miaj maljunaj parencoj kaj de la grupo de e-istoj restis nur du: d-ro Toker kaj mi.

Dum la lastaj jaroj, vivante en Moskvo, mi preskaŭ ne partoprenis la agadon, ĉar estis danĝere havi rilatojn kun eksterlando. Rilatoj kun eksterlando estis sus-



pektindaj kaj povis malhelpi en la laborloko.

Mi mem travivis la kongresojn kaj konvinkiĝis, ke E-o donas la eblecon ne nur interkompreniĝi sed ankaŭ donos"al la mond' eterne militanta belan harmonion".

I. Dektor-Ginsburg

## NIAJ UNIVERSALAJ KONGRESOJ

La Universalaj Kongresoj fariĝas de jaro al jaro pli kaj pli ŝablonaj, unu kongreso similas la alian kun pli aŭ malpli da partoprenantoj. Ĉu iu el ni memoras iun kongreson, kiu kaŭzis drastan ŝanĝon en la neesperanta publika opinio rilate la lingvan problemon?

Ni eble memoras la UK en Hamburgo pro ĝia krizo kaj amara sento en la koroj de ĉiuj esperantistoj. Ankaŭ la UK en Beogrado, kiu parte kaŭzis tiun amaran senton de Hamburgo? Kutime venas la ŝtatoj kaj urbaj reprezentantoj al niaj organizoj, komplimentas kaj aprezas nian laboron kaj eĉ ofte promesas helpi al ni, sed ĉiuj tiuj vortoj restas kiel skribitaj sur glacio.

Ĉiu lando volas inviti al si la UK, ne nur pro prestiĝo, sed pro la gajno, kiun donas UK por la hoteloj, restoracioj, vendejoj, poŝto k.t.p. Sed la Estraro de U.E.A. devas postuli de la Landa Asocio, kiu invitas la kongreson, ke ĝi postulu de la ŝtataj instancoj: 1. Ŝildojn en Esperanto en la flughaveno 2. Enkondukon de E. en la lernejojn. 3. Eldonon de poŝtmarko en aŭ pri E. 4. Instrukcion al la ŝtataj reprezentantoj en Uno, Unesko k.a. apogi niajn proponojn pri la Internacia Lingvo. 5. Subvencii Esperanto-kursojn en la gazetaro, radio kaj televido.

Se neniu de tiuj postuloj estos kontentige plenumita, U.E.A. simple rifuzu la aranĝon de UK en tiu lando.

Dum la UK ni tre malmulte pritraktas la ĉefan nian celon kaj taskon, nome la kreskon de nia movado por ke ĝi fariĝu movado de milionoj. La Landaj Asocioj devas ĉefe agi en tiu direkto! Ne ekzistas pli bona rimedo por propagandi nian ideon ol la UK. En la lando, kie okazas la UK devas dum la kongresa jaro kreski la nombro de niaj adeptoj dekoble kun centoj kaj miloj da novaj s-anoj. La sola mezuro per kiu ni povas juĝi la sukceson de iu UK, devas esti la nombro de novaj s-anoj en tiu lando.

Dum la kongresa semajno, ni devas dediĉi kelkajn vesperojn por la loka ne e-ista loĝantaro, inviti ilin al la kongresejo kaj rakonti al ili pri nia ideo kaj celo. Por fari tiujn vesperojn allogaj, ni povas ekzemple sidigi sur la podio 5 e-istojn el 5 kontinentoj, por ke ĉiu rakontu dum kelkaj minutoj pri sia lando, kiamaniere li lernis E-on, aŭ por kio oni bezonas internacian lingvon.

Ĝio estu tradukata en la lokan nacian lingvon. La publiko povos demandi diversajn demandojn. Aranĝi enigmo-vesperon pri diversaj temoj: geografio, historio, literaturo k.a. kaj disdoni valorajn premiojn al la gajnintoj, kiuj plej bone respondos. Aranĝi mallongan provlecionon post kiu la gelernantoj kapablos skribi mallongan leteretonen E. kaj komenci korespondi kun iu ĉeestanta eksterlandano.

Laŭ mia opinio, se de Grekio, kie nur antaŭ du jaroj okazis UK, aliĝis la UK en Varna nur 3 personoj, ni nenion atingis; ni devas konfesi, ke la UK en Ateno estis fiasko. Ne gravas, ĉu finance ĝi kovris la elspezojn aŭ ne.

Dum la lastaj jaroj oni inter aliaj instruas la nacian lingvon de la UK-lando dum la kongressemajno. Tio okazis en Islando kaj en Bulgario. De unu flanko ni diras, ke E. estas parolata ĉie kaj per E. oni povas en la tuta mondo interkompreniĝi kaj de alia flanko ni kvazaŭ diras: En Romo kondutu kiel la romanoj kaj parolu itale, en Rejkjaviko kiel islandano kaj lernu la islandan lingvon.

La programo de la vesperoj povas esti varia laŭ la plaĉo, kapablo kaj imago de la LKK sed la celo devas ĉiam esti utiligi niajn UK por atingi disvastigon de nia lingvo.

J. Giladi

Noto de la Redakcio: niaj legantoj estas invitataj sendi al ni siajn reagojn al la ĉi supra artikolo.




## ALVOKO AL NIA SAMIDEANARO


Nova kaj malnova samideano! Subtenu la Esperanto-Movadon! Fariĝu membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA)!

Vi aliĝos tiam al la granda tutmonda familio de la Esperantistoj, vi ricevos regule la monatan revuon "Esperanto" kaj la Jarlibron de UEA. Vi trovos multajn rimedojn por uzi la Internacian Lingvon utiligante la servojn de la Movado k.t.p.

Detalojn pri aliĝo oni ricevu ĉe la Landa Kotizperanto, R. Berlinerblaŭ, str. Aĥad-Haam 134, Tel Aviv.



## LA SUGESTINTO



Rakontos mi al vi pri certa ruso
Eposon fablan kun enkerna vero,
Pri vivo de Ilja', hero' sen ruzo.
Per plug' laboris li sur patra tero
Ĉar estis li tutsimpla kamparan',
Vivinta tridek jarojn en kaban'.

Sur vojoj tiam regis la tataroj
Kaj en arbar' rabestro Solovej';
Defend' ne estis kaj nek kontraŭstaroj,
Ilja' ĉar sidis en la hejma ej'.
Aperis tiam ia vagabondo,
El ie venis nekonata bard',
Anoncis:"Venis tempo por respondo,
Ilja',vi estu ĉef' de l' avangard'!"

Ilja' ekstaris kaj ribel-batalis,
Per sago Solovejon traf-regalis,
Potenc' tatara tiam krevis, falis,
Ekregis tiam paco en la mondo.
Sed malaperis bardo, vagabondo.

Li venis, vokis.Ĝi ne estas troo.
Pri li ne sonas kantoj, nek balad'.
Sed tamen, fakte estis li heroo,
Batal-heroo de plej alta grad'!
Rabisto Solovej' lin ĉasis kapti,
Torturi lin ĝis mort', turmente trakti,
Pripensis tiam la tatara ĥano
Kun hundoj ĉason kontraŭ li adapti.
Sed la tataraj penoj restis vano:
Tatarajn sagojn ruze li preteris,
Li ĉiujn persekutojn eltoleris,
Saviĝis fine
kaj jen ... malaperis.

Jen estas tuta lia glora ag':
Alven' kaj vok'; nenion faris plu.
Hero' li tamen estas super la imag',
De fortinspira vorto kaj influ'.
Disĉiploj liaj, ni, kun ĉiu hom'
Adoru lin, sed sci' pri lia nom';
Ĉar ŝuldas la patruj' al li tributon:
Honoran, respektplenan korsalutoni!

Zeev (Vladimir) Jabotinski
El la rusa tradukis J. Kohen-Cedek

## MIKSPOTO DA IMPRESOJ KAJ PENSOJ PRI VOJAĜO

Antaŭ tridek jaroj, je la komenco de la sendependeco de la juda ŝtato, oni diris al Ben-Gurion, ke estas brilaj eblecoj en Israelo por la turismo. Respondis nia unua ĉefministro: "Kion, ĉu vi volas ke Israelo estiĝu ŝtato de kelneroj?"

Nu, ĉu mi pensas, ke Ben-Gurion tute pravis en sia komento mi ne scias, sed pasintan someron mi fariĝis "tipa turisto" en ĉiuj sencoj: mi pasigis du monatojn en vojaĝo en ses landoj: Grekio, Italio, Usono, Francio, Svisio kaj Aŭstrio. Mi vagadis kun mia kara valizeto de urbo al urbo, mi dormis en ĉirkaŭ dudek kvin litoj malsamaj kaj manĝis en kvindek restoracioj. En Italio, ekzemple, nek la "Ruĝaj Brigadoj" nek la senlaboreco okupis mian menson sed la demando ĉu mi devas resti du tagojn en Florenco kaj tri en Venecio aŭ kontraŭe. Kaj ankaŭ kiom da statuoj "Pieta" kreis Mikelanĝelo, kaj ĉu mi vidis ilin ĉiujn. Ĉu valoras pli ŝanĝi miajn dolarojn en la stacidomo aŭ nur en banko.

En unu senco Ben-Gurion pravis. La afero de trinkmono estas tre malagrabla fenomeno. La turisto volas lasi nek tro grandan nek nesufiĉan trinkmonon. Ĉu oni devas lasi ion ankaŭ kiam oni estas servata ĉe bufedo aŭ ĉu nur ĉe la tablo? Kaj la mieno de la servistoj ofte ne estas tro komplimenta por la membroj de la homa raso: foje ridetanta kaj favora por eltiri pligrandan trinkmonon per bonvoleco, kaj ofte severa kaj orgojla por elpreni pligrandan trinkmonon per timigado.

Kaj kiom da problemoj kun taksiŝoforoj kiuj penis elakiri de vi plian kaj plian groŝon. Aŭ ne tre klaraj menuoj en restoracioj kiuj sukcesas ĉiam plialtigi la kalkulon!

Tio estas la negativa flanko de la turismo. La turismo estas vere baza industrio en multaj landoj, sed estas bedaŭrinde, ke tiel ofte la turisto trovas malbonan guston en sia buŝo pro la troigoj de multaj laborantoj en tiu industrio. Nur unu fojon mi trovis servistinon kiu absolute rifuzis akcepti trinkmonon, en malgranda hotelo en Parizo.

Estas multaj turistoj kiuj interesas sin nur pri pejzaĝoj. Ju pli altaj estas la montoj- des pli bone. Mi, kontraŭe, interesas min ĉefe pri la homoj en la diversaj lokoj (kaj ankaŭ iliaj kreaĵoj - la konstruaĵoj kaj la historiaj restaĵoj).

De tre supraĵa rigardo al la homoj en Eŭropo mi dirus, ke nek politikaj nek spiritaj demandoj okupas ilin ĉefe sed ekonomiaj.

Ŝajnas, ke la demando pri la formo de la ekonomio interesas multajn. Mi legis ke en pluraj landoj la homoj komencis perdi la fidon en la "Bonfarta Ŝtato" kaj volas pli da privata entrepreno. Eĉ gvidistino en ekskursa aŭtobuso parolis pri tio (ĝenerale la gvidistoj evitis




paroli pri tiaj aferoj). Ŝi petis pardonon ke la prezoj en ŝia lando estas tiel altaj, sed diris, ke tio estas ĉar la registaro decidis fari tiom da aferoj por la bezonoj de la popolo. Estis en ŝiaj vortoj malrekta malaprobo de tia ekonomio.

Ankaŭ en Usono mi trovis, ke la ĉefaj interesoj estas ekonomiaj. Antaŭ kelkaj jaroj oni povis diri, ke la ĉefaj problemoj de la usonanoj estis politikaj-moralaj: la rajtoj de la nigruloj, Vjetnamio, Vatregejt. Nun la ĉefa intereso ŝajnas esti la inflacio.

La plej frapa ŝanĝo en la lastaj jaroj, kiun mi rimarkis en Usono, estis en la rilatoj inter la du rasoj. Kompreneble estis farata multe da progreso en la alproksimiĝo de la nigruloj kaj blankuloj, sed ĝis antaŭ kelkaj jaroj oni ĉiam rimarkis certan interspacon inter ili. Sed en mia lasta vizito mi vidis multe da vera interproksimiĝo inter la du rasoj. Tre ofte mi vidis blankajn kaj nigrajn homojn paroli unu al la alia, kiel veraj amikoj, sen iu konscio de embaraso. Tre ofte oni vidis grupon da kelkaj blankaj kaj nigraj junuloj marŝantan sur la trotuaro kun ĉia natureco kaj kompleta manko de strangeco, trajtoj, kiuj karakterizis antaŭe nur grupon de samrasanoj. Tiu ŝanĝo kun la nigruloj estas tre pozitiva afero.

Kiam mi estis juna en Usono la rilatoj inter Judoj kaj ne-Judoj estis bonaj, sed oni ĉiam sentis iun "distancon" inter la du grupoj. Nun la juna juda generacio tiel asimiliĝis kun la amerika vivo, ke ili ne vidas iun diferencon inter si kaj la aliaj Amerikanoj. Tio, kaj la lastatempa evoluo ĉe la ne-Judoj de liberala kaj egaleca sinteno al la diversaj popoloj kune kreis la situacion, ke tute ne ekzistas iu distanco inter la du grupoj.



Reuven Alberg

## FORPASO DE D-RO A. ĤOMET


En la 60-a numero de IE (Aprilo 1977) aperis memoraĵoj de d-ro Avraham Ĥomet pri la 12-a UK en la jaro 1912. Nun li mortis. La entombigo okazis la 26.9.1978 en la tombejo Kirjat Ŝaul, Tel Aviv.

La mortinto estis aktiva e-isto, prezidanto de la juda komunumo en la urbo Tarnów (Suda Polio) kaj populara gvidanto de cionista organizo. La militon li travivis en malfacilaj kondiĉoj en Sovetio. Li eldonis 2 librojn pri la historio de la juda komunumo en la urbo Tarnów.

Estu Lia memoro benita!

Iser Levin

1234567890...



## KALKULMETODO DE LA TAGO LAŬ LA DATO

La tago de la semajno estas kalkulebla, se ni scias la precizan daton. Post iom da praktiko oni povas tiun tagon elkalkuli eĉ parkere. Oni devas por tiu celo memori kelkajn nombrojn kaj fari kelkajn aritmetikajn operaciojn. La metodo estas uzebla por la pasinteco kaj por la estonteco eĉ malproksima. Por la pasinteco oni devas scii ion pri la juliana kaj gregoriana kalendaroj. La nuna kalendaro - gregoriana - estis enkondukita de la papo Gregorio en la jaro 1582; ĝis tiu dato oni uzis la julianan kalendaron, kiun enkondukis Julio Cezaro en la jaro 46-a antaŭ Kristo.

La gregoria kalendaro ne estis akceptita samtempe en la tuta mondo. Polio akceptis ĝin en la jaro 1587, simile Hungario. La nekatolikaj landoj akceptis ĝin pli malfrue. Svedio, Danio, parto de Germanio, akceptis ĝin en la jaro 1700, Anglio kaj Norda Ameriko en la jaro 1752, Japanio - 1873, Rusujo-1918, Grekio-1923 kaj Turkio-1926. Tiuj datoj estas gravaj por la kalkulo de la pasinteco.

### La kalkulo de la gregorianaj datoj.

Kion ni devas memori?

1. Dimanĉo estas la unua tago de la semajno, lundo la dua, k.t.p. (sabato-la 7-a).
2. La jaro por nia kalkulo ne komenciĝas de la unua de januaro sed de la unua de marto kaj finiĝas la 28-29-an de februaro.
3. Ĉiu monato ricevas koeficienton por la kalkulo. La koeficientoj estas:

marto - 3, aprilo - 6, majo - 1, junio - 4,
julio - 6, aŭgusto - 2, septembro- 5, oktobro - 0,
novembro- 3, decembro - 5, januaro - 1, februaro - 4,

4. La nombron de la jaro dividu je du partoj: jarcentoj, kaj la restaĵo; ekzemple: la jaron 1871 dividu tiel: 18-71.

La unuan parton (la nombron de la jarcentoj) dividu per 4.

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Se | la | restaĵo | estas | 1 | prenu | la | koeficienton | 5. |
| " | " | " | " | 2 | " | " | " | 3. |
| " | " | " | " | 3 | " | " | " | 1. |
| " | " | " | " | 0 | " | " | " | 0. |

La duan parton ( la nombron de dekoj kaj unuoj) dividu je 4 kaj prenu la restaĵon. La kvocienton multobligu per 5 kaj dividu per 7. Prenu refoje la restaĵon.

5. Nun sumigu la daton de la tago kun la koeficiento de la monato kaj la koeficiento de la jarcento kaj la 2 restaĵoj de la dekoj kaj unuoj. De la sumo subtrahu nombron dividitan per 7. La restaĵo indikas la tagon de la semajno.

Ekzemplo: 18.6.1914.



18 - 6 - 19 - 14
-14
4 + 4 + 1 + 2 + 1= 12
12-7=5 (ĵaŭdo)

$\frac{14}{4} = 3^{+}(2)$

$\frac{3x5}{7} = 2 \quad +(1)$

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

15.2.1982
15 - 2 - 19 - 81
-14
1 + 4 + 1 + 1 + 2 = 9

$\frac{81}{4} = 20^{+}(1)$

$\frac{20x5}{7} = 14^{+}(2)$

9-7=2 (lundo)

La kalkuloj aspektas malfacilaj sed estas vere simplaj. Rimarko: Kompreneble ĉiu kalkulas antaŭ ĉio sian naskiĝtagon kaj demandas la patrinon pri konfirmo. Memoru, ke multaj homoj naskiĝas nokte kaj estas enkribitaj dum la sekvonta tago. Pro tio estas diferenco inter la memoro de la patrino kaj la rezulto de la kalkulo. En tiu kazo estu certa, ke la kalkulo pravas.

### La kalkulo de la julianaj datoj.

La sola diferenco inter la kalkulo de gregorianaj kaj julianaj datoj estas la koeficientoj de la jarcentoj. La nombron de la jarcentoj dividu per 7.

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Se | la | restaĵo | estas | 0 | la | koeficiento | estas | 5 |
| " | " | " | " | 1 | " | " | " | 4 |
| " | " | " | " | 2 | " | " | " | 3 |
| " | " | " | " | 3 | " | " | " | 2 |
| " | " | " | " | 4 | " | " | " | 1 |
| " | " | " | " | 5 | " | " | " | 0 |
| " | " | " | " | 6 | " | " | " | 6 |

La aliaj detaloj de la kalkulo estas identaj kun la gregoriana kalendaro.

Ekzemplo: 15.5.1492
15 - 5 - 14 - 92
-14
1 + 1 + 5 + 3 = 10

92:4= 23 (0)

$\frac{23x5}{7} = 16^{+}(3)$

10 - 7= 3 (mardo)

I. Levin, Ramat Gan, Etzel st.7/22

Rimarko: la koeficientoj de la monatoj estas malfacilaj por parkerigi ilin, sed en hebrea lingvo literoj signifas nombron kaj tiamaniere estas facile krei mnemonikan formulon. Tio ne estas farebla en Esperanto. Se iu de la legantoj trovos mnemonikan formulon por Esperanto mi petas lin sciigi min pri ĝi. Mi dankas antaŭe.



## ISRAELAJ ATINGAĴOJ


En la lastaj numeroj de nia bulteno, ni sciigis pri la atingaĵoj de Israelo en la eluzo de la dolĉa akvo. Hodiaŭ ni volas sciigi pri la nova fonto de la dolĉa akvo, kiun komencis eluzi nia lando.

La tuta kvanto de la akvo, kiun oni povas havi en iu ajn lando, devenas de la pluvo, kiun la naturo ŝparas en Israelo. La nuboj malsekigas la teron kaj la ensorbita akvo kolektiĝas en la profundo de la tero. Tiu akvo poste elfluas per la naturaj fontoj, aŭ estas ĉerpata per la pumpiloj de profundaj putoj. Bedaŭrinde evidentiĝis, ke ni ne povas senfine ĉerpi la akvon de la putoj, ĉar eĉ en la putoj la akvo elĉerpiĝas kaj la puto ensorbas la akvon de la sala maro. La saligita akvo en puto malebligas daŭran eluzon de la puto. La puto ree povas pleniĝi, se la riĉaj pluvoj ree plenigos la akvujojn en la profundaĵo.


Tio estis la kaŭzo, ke la homoj en la tuta mondo komencis esplori ĉu oni ne povas pligrandigi la kvanton de la pluvoj. La afero ne estas simpla kaj la eksperimentoj daŭras en la tuta mondo. En Israelo ni jam povas paroli ne pri provoj sed pri la rezultoj. Dum la lastaj jaroj ni sukcesis pligrandigi la kvanton de la pluvoj en la Alta Galileo je 20%, aldonante al la Tiberiada Lago 200 milionojn da kubaj metroj da akvo. Tiu kvanto estas mezurebla en la Lago Tiberiado, de kiu ni ĉerpas akvon por konduki ĝin al la suda dezerto Negev. Tiu forpreno de la akvo kaŭzis malaltigon de la nivelo de la akvo en la lago. Ĝi kaŭzis niajn ekologiajn zorgojn pri la ĉirkaŭaĵo. En la lasta jaro ni sukcesis ree plenigi la lagon per aldono de la menciitaj pluvoj.

Aldone ni devas diri, ke la akvo, kiun ni ricevas de la pligrandigita pluvo, estas pli malmultekosta ol ĉiu alia akvo, kiun ni per aliaj artaj rimedoj ricevas. Por informo: la pliriĉigon de la pluvoj ni atingas per aldono al la nuboj de arĝenta klorido. La rimedo estas delonge konata, sed la atingaĵoj estas akiritaj per la eltrovo kiel, kiom kaj kiam oni devas dissuti la kristaletojn de arĝenta klorido de aviadiloj sur la nubojn kaj bruligi la brulŝtiparojn, kies fumo supreniranta enhavas la saman arĝentan kloridon. Tiuj fumoj atingante la nubojn per la arĝenta klorido pligrandigas la kvanton da pluvo.

H.M.







## KREDU AŬ NE

En junio 1975 aperis en la fama usona gazeto "Newsweek" la rezultoj de esploro pri la historio kaj kutimoj de la indiana tribo JOĈI, vivanta en rezervejo en la usona ŝtato Oklahomo.

Jene ĝi skribis: "Ekspertoj pri la indiana folkloro opinias, ke la vestoj, la lingvo kaj la aspekto de tiu ĉi tribo atestas pri ĝia juda deveno."

"Epigrafoj malkovritaj sur rokoj en la ŝtatoj Tenesio kaj Gorĝio pruvas, ke la hebreoj vagadis de Israellando al Ameriko antaŭ 3000 jaroj."

La teorio pri la "judeco" de la Indianoj ne estas nova. Kelkaj historiistoj kaj esploristoj publikigis jam antaŭ dekoj da jaroj siajn teoriojn pruvante, ke la indianaj triboj de Norda Ameriko estas praidoj de la 10 perditaj hebreaj triboj.

Unu el ili, la misiisto John Eliot, skribis jam en la 17-a jarcento, ke la baza lingvo de la ruĝhaŭtuloj similas al tiu de la hebreoj.

Apogis lin en 1923 la esploristo E. Smith, kiu proklamis, ke la indiana bazlingvo posedas klarajn hebreajn fundamentojn, ĉar ĝi ne havas prepoziciojn kaj ĝi konsistas el silaboj en la komenco kaj en la fino de la vorto, servantaj kiel prepozicioj.

Pastro Poerta, teologo de Kolombio, asertas ke la 10 triboj estis la unuaj, kiuj malkovris Amerikon. Li montris en multaj lokoj en Kolombio antikvajn fajencaĵojn kaj ankaŭ rokojn sur kiuj aperas gravuritaj literoj en la hebrea lingvo.

Ni revenu al la supre menciita tribo JOĈI: krom ĝiaj (tiel dirite) "judaj vizaĝtrajtoj" kaj "simila dialekto" ĝi "konservas kelkajn judajn kutimojn", ekzemple: ili festas 8 tagan feston, dum kiu ili manĝas kaj eĉ tranoktas en laŭboj (budoj), tegitaj per branĉoj, kio certe memorigas al ni nian feston de laŭboj (hebree : SUKOT)...

Kion vi diras pri tio?

J. Ŝ.






## POŜTMARKOJ PRI ESPERANTO PREMIITAJ

Mi estas filatelisto ekde mia infaneco. Post kiam mi lernis E-on, mi eksciis, ke ekzistas poŝtmarkoj, eldonitaj en diversaj landoj, okaze de internaciaj kongresoj de E-o. Mi komencis kolekti tiujn poŝtmarkojn kaj por tiu celo mi korespondis kun 15 diversaj landoj kaj pere de e-istoj mi sukcesis ricevi ĉiujn poŝtmarkojn kaj grandan nombron de poŝtstampoj pri E. Nun mi estas la sola filatelisto en Israelo, kiu posedas kompletan kolekton de p.m., kiuj temas pri E-o.

De tempo al tempo okazas en multaj landoj ekspozicioj de p.m., kiuj estas vizitataj de amasoj da homoj, ankaŭ tiuj, kiuj ne kolektas la p.m., ĉar ĉiuj scias, ke filatelo estas tre utila afero, kiu ebligas ekkoni la historion, geografion, sciencon kaj aliajn interesaĵojn en la mondo. Ankaŭ en Israelo okazas ekspozicioj de p.m. Mi ĉiam partoprenis ilin kun kelkaj el miaj kolektoj. En la jaro 1970 okazis granda filatela ekspozicio en Tel-Avivo, nomita "Tabit 70". Mi ekspoziciis mian kolekton de p.m. pri E-o kaj ĝi estis elektita, kiel unu el la plej belaj kolektoj kaj ricevis premion. Ĉi jare en aprilo okazis en Jerusalemo la plej granda ekspozicio de p.m. okaze de 30 jaroj de Israelo. Mi ĝin ree partoprenis kaj ree mia kolekto de"Esperanto sur poŝtmarkoj" estis elektita, kiel unu el la plej bonaj kolektoj kaj ricevis premion.

Inter la vizitantoj de tiu ekspozicio estis miloj da junuloj, kiuj interesiĝis pri tiu kolekto ne sufiĉe konata inter la junaj kolektantoj kaj mi ricevis multajn leterojn kun demandoj pri E-o.

Natan Heller



Niaj novaj samideanoj skribas:

### KIEL MI PASIGIS LA MONATON AŬGUSTO

Ĉar dum la monato aŭgusto la E.-klubejo en T-A estis fermita, ni decidis fari ion. Multaj de ni ne parolas bone la lingvon, ĉar la kursoj ne sufiĉas por scii paroli kaj krome ni ne havas okazon paroli. Ni petis Sinjorinon Dora Vunderbaŭm fari kurson por paroligi nin. Kiam ŝi konsentis, mi donis mian hejmon kaj invitis ĉiujn veni ĉe mi kaj fari tiun kurson unu fojon en semajno. Ĉiu el ni rakontis ion kaj ni parolis libere. Unu fojon ni ludis pilkon kaj devis diri vortojn kiuj komenciĝas per iu certa litero. La lastan fojon ni estis ĉe Roval kafejo. Dora metis esperantan flageton sur tablo kaj ni sidis kaj parolis pri diversaj aferoj. Tio estis la plej interesa monato por mi, preskaŭ nova esperantistino. Mi pensas, ke sinjorino Dora devas daŭrigi tiun kurson kun ni!

Matilda Landaŭ



## ANGULO DE JELI


### LIMERIKOJ



1. Sur la kampo antaŭ unu tago
Trafis lian koron ama sago
Sed ŝi lin rifuzis
Ĉar li pipon uzis
Do li tuj rezignis pri ĉi-ago.



2. Sur la kapo de nia najbaro
Ne restis eĉ unu sola haro
Pri duono kulpas la edzino
Pri l' alia la prez' de l' benzino
Ekde nun veturos li per ĉaro.



3. Amas ŝi ŝipanon tridekjaran
Sed li amas nur la venton maran
Por lin logi blovis ŝi plenpulme
Sed de ŝi forkuris li tuj fulme
Car preferas li liberon karan.


Muŝpelant'



4. Verdokula blanka kato-
Lin timegis nigra rato,
Dum vespero li promenis
Kaj la rato tuj festenis
Ĝis matene kat' revenis.

Musĉasant'

### VITRAĴO




Diris vitrino al la fenestret':
"Vi estas bonŝanca, ho kara vitret'
Ĉar vi estas vira, ja vitro vi estas
Kaj mi ja vitrINO", la ino protestas.
Inviton ŝi tuj havis al kabaret'...

### NOVAJ SAMIDEANOJ

| | |
|---|---|
| Avrahami Cvi | Rapaport Nica |
| Avrahami Joĥeved | Rapaport Ĥedva |
| Zak Israel | Niudo Bronia |
| Sani Raĥel | Lohr Ilan |
| Ŝoĥat Fani | Ĥitron Binjamin |
| Feigenblat Orli | Ideloviĉ Lidica |
| Miron Adi | Amitaj Avigail |
| Amitaj Tali | Ĥafri Sara |

## KURSOJ

En Tel-Avivo okazis 2 kursoj de Esperanto en la Klubo de Pensiuloj. Gvidis ilin s-anino Dora Vunderbaŭm.




## JARKOTIZO POR E.L.I.

Ni afable petas ĉiujn samideanojn, kiuj ankoraŭ ne pagis la jarkotizon por 1978 (50 IL.), plenumi ilian devon, uzante la ĉi-kunan poŝtpagilon.

La Estraro de ELI informas pri plialtigo de la kotizo por 1979 al 100 IL.

Koran antaŭdankon!



## DONACOJ

| | |
|---|---|
| Tramer Sara (pere de d-ro Maŝler) | 130 IL |
| Semmler Brigitte (okc. Germ) 20 GM. | 174 " |
| Lev Jaakov | 100 " |
| Hochhauser Tova | 100 " |

## VOLAS KORESPONDI

Mark Pallen 18 jara studento de medicino; pri scienco religio, arto, lingvoj kaj moderna filozofio. 12 Manor Road North, Wallington, Surrey, SM6 7NT, Anglio.

o o o o

Kurt Niederbröker, D-498 Bünde 1, Bindingstr.9 , West-Germany; kun iu ajn israelano. (Germanio)

o o o

Ladislaŭ Pohl, 4800 Sala Mare, Ar. Caragiale=/21, Rumanio; Filatelisto.

o o o o

Randy Wettreich, 4685 Victoria Avenuo, Montreal, Que, H3W 2M9 Kanado; 22-jara judo, ne edziĝinta; kun gejudoj de la tuta mondo, precipe en Israelo. Ŝatokupoj: muziko, libro-legado, leterskribado pri ĉiuj temoj.

o o o o

Kostadin St. Kostadinov, Bul. Dimitar Balgoev 15-A, Sofia 1606, Bulgario

o o o o

D-ro Géthy Ladislav, Hungario, H:4800: Vásárosnamény, str. Árpád 2.

o o o o

## Mikspoto da impresoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| akcepti | לקבל | aprobo | אישור |
| asimiliĝi | להתבולל | bufedo | מזנון |
| ekonomio | כלכלה, משק | eviti | למנוע |
| embaraso | מבוכה | evoluo | התפתחות |
| entrepreno | מפעל | farti | להרגיש בקו בריאות |
| fido | אמון | favora | אוהד |
| fenomeno | תופעה | groŝo | גרוש |
| industrio | תעשיה | kelnero | מלצר |
| komplimento | מחמאה | komenti | לפרש, להביע דעה |
| konscio | הכרה, תודעה | morala | מוסרי |
| mieno | הבעת פנים | menuo | תפריט |
| menso | רוח, שכל, תבונה | orgojla | גאוותני |
| prava | צודק | raso | גזע |
| rilato | יחס | rifuzi | לסרב |
| rajto | זכות | reg/ist/aro | ממשלה |
| sin/teno | עמדה | spaco | חלל |
| supr/aĵa | שיטחי | statuo | פסל |
| tipa | טיפוסי | trajto | תוי פנים |
| trotuaro | מדרכה | vagi | לנדוד |
| valizo | מזוודה | | |

## El la hostrio de nia Movado


| | | | |
|---|---|---|---|
| agema | פעיל | celo | מטרה |
| evoluo | התפתחות | elstara | בולט |
| etoso | אווירה | fabelo | אגדה |
| fervora | נלהב | grajno | גרעין |
| konsilanto | יועץ | movado | תנועה |
| oficejo | משרד | planko | רצפה |
| semi | לזרוע | societo | חברה |
| subbstreki | להדגיש | | |

## Impresoj de kongresano en Varno

| | | | |
|---|---|---|---|
| akiri | להשיג | aparta | נפרד |
| arbusto | שיח | bankedo | סעודה חגיגית |
| ĉe/esti | לשהות, להשתתף, להיות נוכח | distro | בידור |
| balo | נשף | eminenta | נעלה, נכבד |
| el/stara | בולט | ekipi | לצייד |
| instali | להתקין | giganta | ענקי |
| klopodi | להשתדל | kreski | לצמוח, לגדול |
| komitato | ועד | leĝo | חוק |
| oficiala | רישמי | peri | לתווך |
| pastro | כומר | preĝo | תפילה |
| pitoreska | ציורי (נוף) | rompi | לשבור |
| rilato | יחס | subvencio | מענק, תמיכה |
| streĉo | מתח | sperto | ניסיון |
| ŝoseo | כביש | tapiŝo | שטיח |
| tósti | לשתות לחיים | tegmento | גג |
| trafi | לפגוע (במטרה) | | |



## Vortareto por komencantoj



## Kredu aŭ ne

| | | | |
|---|---|---|---|
| atesti | להעיד | apogi | לתמוך |
| aserti | לטעון, לקבוע (בחוות דעת) | budo | סוכה, צריף |
| dialekto | ניב | eksperto | מומחה |
| esploro | חקירה, מחקר | epigrafo | כתובת חקוקה |
| fajenco | חרס | gazeto | עתון |
| fundamento | יסוד | gravuri | לחרוט |
| haŭto | עור | laŭbo | סוכה |
| mencii | לציין | misi/isto | מיסיונר |
| proklami | להכריז | rezulto | תוצאה |
| rezerv/ejo | שמורה | simila | דומה |
| silabo | הברה | tegi | לסכך, לכסות |
| trajto | תו פנים, קו האופי | tribo | שבט |
| vagi | לנדוד | | |

## Nia vojo al la fina venko

| | | | |
|---|---|---|---|
| amaso | המון, ערמה | asocio | אגודה |
| avantaĝo | יתרון | atingi | להשיג, להגיע |
| akiri | להשיג | ano | חבר (בארגון), תושב... |
| agi | לפעול | adepto | חסיד (של רעיון) |
| disko | תקליט | esploro | חקירה, מחקר |
| evidentiĝi | להתברר | fremda | זר |
| filio | סניף | fiaski | להכשל |
| framasonoj | הבונים החופשיים | fonto | מקור, מעיין |
| flamo | להבה | gazet/aro | עיתונות |
| institucio | מוסד | instigi | לעודד, לשלהב |
| instanco | ערכאה, שלב שילטוני | intervjuo | ראיון |
| koncentri | לרכז | kotizo | דמי חבר |
| kun/sido | ישיבה | kondiĉo | תנאי |
| kapabla | בעל יכולת, מוכשר | maturo | בגרות |
| lerta | זריז | nivelo | רמה |
| mencii | לציין | paŝo | צעד |
| obstaklo | מכשול | proponi | להציע |
| periodo | תקופה | publici | לפרסם |
| postuli | לדרוש | rimedo | אמצעי |
| profito | רווח | rondo | חוג |
| resumo | תמצית, סיכום | sub/teni | לתמוך |
| solvi | לפתור, להמס | subvencio | מענק, |
| sperta | בעל נסיון | streĉo | מתח, מתיחות |
| ŝpari | לחסוך | venko | ניצחון |
| testamento | צוואה | | |

## La sugestinto

| | | | |
|---|---|---|---|
| ago | פעולה | adori | להעריץ, להוקיר |
| adapti | לסגל | avangardo | כח חלוץ |
| bardo | זמר עם נודד | ĉasi | לצגד |
| disĉiplo | חניך | eposo | אפוס, סוג של יצירה סיפורית |
| fablo | סיפור עם, משל מחיי חיות | gloro | תהילה |
| inspiro | השראה | imago | דמיון, מושג |
| kerno | גרעין | krevi | להתפוצץ |
| kabano | ביקתה, צריף | kamp/ar/ano | איכר |
| preter | על פְּנֵי | persekuti | לרדוף את... |
| potenco | עוצמה | plugi | לחרוש |
| ribelo | מרד | regali | לכבד |
| ruza | ערום, ערמומי | rabi | לשדוד |
| sugesti | להשפיע באופן נפשי | sago | חֵץ |
| toleri | להתיחס בסובלנות | turmenti | לייסר, לענות |
| trakti | להתיחס אל... | torturi | לְעַנּוֹת |
| tributo | מתן כבוד, מס | trafi | לפגוע |
| vagabondo | משוטט בדרכים, נודד | | |

## Limerikoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| ago | פעולה | blovi | לנשוף, לנשוב |
| ĉaro | עגלה | fulmo | ברק |
| kulpo | אשמה | kampo | שדה |
| logi | לפתות ולמשוך | limeriko | חמשיר |
| peli | להאיץ, להריץ | protesti | למחות |
| pipo | מקטרת | pulmo | ריאה |
| rezigni | לוותר | rato | עכברוש |
| trafi | לפגוע למטרה | sago | חֵץ |

## Poŝtmarkoj pri Esperanto

| | | | |
|---|---|---|---|
| celo | מטרה | ekspozicio | תערוכה |
| elekti | לבחור | filatelisto | אספן בולים |
| premio | פרס | posedi | להיות בבעלות |
| stampo | חותמת | | |

## Kalkulmetodo de la tago

| | | | |
|---|---|---|---|
| akcepti | לקבל | aritmetiko | חשבון |
| identa | זהה | konfirmo | אישור |
| kalendaro | לוח שנה | kalkuli | לחשב |
| koeficiento | מקדם, גורם מסיע | kvociento | מנה (בחילוק) |
| mnemoniko | חוכמת זיכרון | operacio | פעולה בחשבון |
| preciza | מדוייק | parkere | בע"פ |
| papo | אפיפיור | prava | צודק |
| sumigi | לסכם | subtrahi | להחסיר |

## 55 jaroj kun Esperanto

| | | | |
|---|---|---|---|
| babili | לפטפט | bari | לחסום |
| Dravido | דרוויד (בן כת הודית) | etoso | אווירה |
| ekonomia | כלכלי | eterna | ניצחי |
| fremda | זר | fervora | נילהב |
| grandioza | נהדר, מפואר | intonacio | הטעמה |
| konvinki | לשכנע | konkludi | להסיק (מסקנות) |
| Litovio | ליטא | murdi | לרצוח |
| minaci | לאיים | prelego | נאום |
| parenco | קרוב משפחה | prononco | ביטוי, מבטא |
| salajro | משכורת | suspekti | לחשוד |
| vigla | זריז, קל תנועה | valuto | מטבע זר |

## Niaj universalaj kongresoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| amara | מר | asocio | אגודה |
| aprezi | להעריך | apogi | לתמוך |
| adepto | חסיד (לרעיון וכ"ד) | al/loga | מפתה, מושך |
| dediĉi | להקדיש | drasta | חריף, דרסטי, נמרץ |
| enigmo | חידה | el/spezo | הוצאה |
| flug/haveno | נמל תעופה | fiasko | כישלון |
| glacio | קרח | instanco | ערכאה שלב שילטוני |
| instrukcio | הוראה | imago | דימיון |
| krizo | משבר | kontinento | יבשה |
| kapabla | מוכשר, בעל יכולת | konfesi | להתוודות, להודות |
| komplimento | מחמאה | kreski | לצמוח, לגדול |
| mezuro | מידה | podio | במה |
| proponi | להציע | provi | לנסות |
| postuli | לדרוש | premio | פרס |
| prestiĝo | יוקרה | plaĉi | למצוא חן |
| rimedo | אמצעי | rifuzi | לסרב |
| rilate | בקשר ל... | reprezenti | לייצג |
| simila | דומה | subvencii | לתת תמיכה, סיוע |
| ŝablona | שגור | tasko | משימה, תפקיד, שיעור |
| trakti | לטפל ב... | temo | נושא |
| utila | מועיל | | |

## Israelaj atingaĵoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| ating/aĵo | הישג | akiri | להשיג |
| bulteno | בטאון, עלון | ĉirkaŭ/aĵo | סביבה |
| ĉerpi | לשאוב, לדלות | eksperimento | ניסוי |
| esplori | לחקור | fonto | מקור, מעיין |
| kvanto | כמות | klorido | כלוריד |
| konduki | להוביל | kristalo | גביש |
| lago | אגם | mencii | לציין, להזכיר |
| nubo | ענן | puto | באר |
| profunda | עמוק | provi | לנסות |
| pumpi | לשאוב | rimedo | אמצעי |
| sorbi | לספוג | ŝuti | לשפוך (חומר יבש) |
| ŝtipo | גזר עץ | | |